



LA ARTO DE LA REZISTADO

En la ekspozicio “Sekretaj laboroj”, montrata(*) en la donostia(1) librejo Kaxilda [prononcu kaŝilda], videblas dudek laboraĵoj de la ĵurnalisto kaj artisto Zehra Dogan, realigitaj subtere. Dogan estas enkarcerigita fare de Turkio.

Zehra Dogan restas enprizonigita, ĉar ŝi faris pentraĵon. Ŝi estas ĵurnalisto kaj artisto, naskiĝinta en Norda Kurdio(2). Same kiel ŝian ĵurnalan laboron, ŝi utiligas ŝian arton por montri la realecon de la kurda popolo. Ŝi estiĝis ikono de la politika persekuto kontraŭ la kulturo en la lastaj jaroj, kaj ekzistas internacia movado, kiu postulas ŝian liberigon. Tial, kunlabore kun la reta gazeto *Kedistan*, la donostia librejo Kaxilda ekzpozicias kopiojn de dudek el ŝiaj pentraĵoj. Ili estas faritaj subtere, uzante ĵurnalfoliojn kiel tolon. La ekzpozicion oni nomis “Sekretaj laboroj”, kaj ĝin oni malfermis hieraŭ. Manke de la artisto, la inaŭguron ĉeestis la muzikisto Ali Haydar Iscen kaj la poeto Yohann Villanua. Eblos ĝin viziti dum la venontaj kvin semajnoj.

Dogan naskiĝis en Amedo, en 1989. Ŝi licenciĝis pri belartoj kaj serĉis sian oficon en la ĵurnalismo. Kune kun aliaj ĵurnalistinoj ŝi fondis en 2013 la novaĵagentejon *JINHA*, ne hazarde iun 8-an de marto. Ne hazarde, ĉar ĝi estis projekto konsistigita nur de virinoj kaj kies akso estis pritrakti la informojn el feminisma vidpunkto. La agentejo rapide etendiĝis en Norda kaj Suda Kurdioj(3), sed en 2016 la turka registaro ĝin fermis, same kiel ĝi tion faris kun aliaj pli ol cent amaskomunikiloj. Tamen, Dogan daŭre denunciadis la ŝtatan perforton kontraŭ la kurda popolo kaj montris la situacion de la virinoj. Ŝi estis el la unuaj, kiuj kolektis atestojn de jazidaj virinoj sekse sklavigitaj de la Islama Ŝtato, kaj pro tio ŝi ricevis en 2015 la ĵurnalismopremion Metin Gokĉepete. Tiam oni ŝin akuzis esti membro de kontraŭleĝa organizaĵo, kaj tiel ŝi estis unuafoje enkarcerigita.



Decembre de 2016 ŝi estis provizore elkarcerigita. Sed post nelonge ŝi estis denove kondamnita, ĉar ŝi montris en pentraĵo la detruon de Nisebino(4) – inter 2015 kaj 2016 ĝi estis loko de gravaj konfrontiĝoj inter ties kurdaj loĝantoj kaj la turka armeo—. Ŝi pentris laŭ la bildo de la fotisto Refik Tekin, montrante la urbon detruitan de la tankoj, kaj elstarigante per viva ruĝo la turkajn flagojn ĉe la konstruaĵoj, kiuj restis starantaj. La bildo disvastiĝis tra interreto kaj ricevis fortan eĥon, kaj, kiam ĝi atingis la okulojn de la turka registaro, oni procesis Doganon kaj ŝin kondamnis pro “terorisma propagando”. “Oni kondamnis min je du jaroj kaj dek monatoj da karcerado nur pro tio, ke mi pentris turkajn flagojn sur la domrubaĵoj. Tion detruis ili, mi nur pentris la rezulton”, ŝi skribis en ŝia tviter-konto.

Koninte la verdikton ŝi kaŝis sin ĉe geamikoj. Ŝi daŭre laboris subtere de marto ĝis la 12-a de junio de 2017, kiam oni ŝin arestis; kaj ĝuste el tiu periodo estas la pentraĵkopioj, kiujn oni ekspozicias en Kaxilda. Ŝi prenis foliojn de la ĵurnaloj, kiuj informis pri la okazintaĵoj en Kurdio, kaj per bildoj ŝi rerakontis, kion diris la subaj vortoj, alportante vivkoloran rakontadon sur la blankonigro. Videblas krioj, korpduonoj, sangelverŝoj, protestantaj homoj, detruitaj loĝejoj. “Ĝi estas kartografio de la hororo”, laŭ vortoj de la Kaxilda-anoj.

“Ni preferus, se estus la originaloj, sed tiuj estas en bonaj manoj, for de la turka cenzuro”, klarigis Dario Malventi, ano de la librejo. Tamen, Malventi negravigis la fakton, ke ili ne estas originalaĵoj. “Kio interesas al ni, estas montri la realecon de batalanta komunumo. Ofte ŝajnas, ke oni nenion povas fari, kaj tiu ĉi estas maniero tion fari. Kio valoras, estas la rakontado, kiun formas Dogan; kiel la kreado povas formi novajn rakontadojn.” Cristina Martinez, membro de Kaxilda, substrekis la “ĉefan rolon”, kiun ludas la kreokapablaj fortoj en ekstremaj situacioj “La kreadekzerco estiĝas pluvivadekzerco.”

Dogan plenumos sian kondamnon en februaro, sed, kiel diris Malveti, oni estas “liganta kondamnon kun alia” al ŝi, kaj “ŝi eliros kun la risko denove reveni karceren”. Dume, Dogane daŭre pentras. “Kompreneble, ŝi ne havas la necesajn materialojn. Ŝi utiligas ion ajn: birdfekaĵon, nutraĵojn, menstruan sangon ...”, klarigis Martinez. Ankaŭ ŝi daŭre organizas ŝian revenon al la ĵurnalistlaboro; kune kun aliaj virinoj ŝi kreis la ĵurnalon *Özgür Gündem Zindan*(5).



“Miloj da Zehra”

Oni volas utiligi la ekspozicion precipe por videbligi la rezistadon de la kurda popolo. “Estas miloj da Zehra”, substrekis Malventi. “La kurda lukto frakasis la ideon de unu nacia identeco kaj difinis la lukton kiel kunlaboradon inter la popoloj; tio estas kialo, por ke ni engaĝiĝu je ĝi, ĉar pli interesas al ni iu kontraŭŝtata lukto.”

Ankaŭ oni volis renkontigi la kurdan komunumon de Eŭskio, “logante” ĝin per la ekspozicio. Krom ĝi, la 12-an de decembro oni montros la dokumentfilmon de Karlos Zurutuza *Irakeko kurduak, bizitza bazterbidean*(6), kaj estos debato kun la ĵurnalisto Manuel Martorell kaj la asocio *Suargi*.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) El Donostio. Donostia. En la eŭska. Ĝi estas la ĉefurbo de la provinco Gipusko/Gipuzkoa.
- (2) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (3) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (4) Nisêbin.
- (5) La karcerĉelo de la Libera Agendo.
- (6) Sudaj kurdoj, vivo ĉe la vojrandoj.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Itziar Ugarte Irizar.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 29-an de Novembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.

